mes communiquent plus aisément entre eux. Un désir qui trouve peut-être sa motivation dans l'expérience de la division. Si Zamenhof, Polonais, a vécu dans un ghetto à un carrefour d'ethnies et de langues, Stambach, en tant qu'Alsacien, a été tiraillé entre deux langues maternelles. Mais, lui, fonde cette attirance du côté du rêve. « S'il fallait trouver l'origine de mon envie d'étudier l'espéranto, il faudrait remonter dans mes souvenirs d'enfance », explique-t-il. « Je me souviens d'une cabine téléphonique déréglée qui jouxtait la maison de ma grand-mère. On pouvait téléphoner sans payer. Alors âgé de douze ans, je compulsais les annuaires, à la recherche d'interlocuteurs différents. Mes coups de fil internationaux, faisant fi du décalage horaire, me mettaient en contact avec des voix du bout du monde. La joie se doublait d'une frustration. Le barrage de la langue écourtait l'appel. A l'époque, j'ai rêvé d'une langue unique qui résoudreait ces problèmes. »

Plus tard, ce sont les voyages qui ont tout déclenché. Voyageur invétéré, il voit l'espéranto comme un outil privilégié. « J'aime partir vers des pays

lointains. L'Amérique latine, la Chine par le Trans-sibérien Paris-Pékin. Pour me préparer, j'avais pris des cours de chinois pendant un an. C'était bien sûr insuffisant. D'où une certaine déception. Dès qu'une conversation prenait un tour intéressant, les mots ne suivaient pas ! », déplore Gilbert.

Pourtant il ne désarme pas. Il apprend que des associations espérantistes éditent des annuaires, regroupant les fidèles de chaque pays. Noms, adresses, téléphone des espérantistes figurent ainsi que diverses précisions telles que leurs hobbies ou leur profession. Ce réseau espérantiste permettra à Gilbert, lorsqu'il sera suffisamment perfectionné, de nouer des contacts privilégiés lors de ses pérégrinations.

Le succès de cette langue demeure aléatoire, mais sa valeur profondément humaniste mérite toutes les attentions. A long terme, quel avenir pour l'espéranto ? « Son succès est précaire. Pourtant, il faudrait peu de choses pour que ça marche », affirme Gilbert. Qu'importe ! Il continue d'étudier. Le monde recèle encore quelques millions d'espérantistes.

Françoise Emsalem



ATTENTION!... Vous trouverez dans ce n° de "La Informilo" vos bulletins d'adhésion à notre 35^{ème} Stage Pratique d'Espéranto Parlé (HAGUENAU), au Congrès National d'UFE (PAU) et au Congrès Universel de UEA (VALENCIA), au 48^{ème} Congrès National de SAT-Amikaro (HEROUILLE-ST-CLAIR)

===== ANGULO de la PREZIDANTO =====

80 numeroj aŭ 20 jaroj...

Nia moderna epoko privilegias la punktan eventon, la sensacian novaĵon; diknigras la titoloj sur la frontpaĝoj de la gazetoj, kaj por informi aŭ distri la legantojn skribas profesiuloj pri komunikado. Ankaŭ la esperanto-gazetaro profitas tiujn novajn konojn por disvastigo de novaĵoj, eĉ se la profesiuloj ne abundas en niaj rondo.

Tamen nia legantaro federacia certe konstatis, ke la ĉefredaktisto de "LA INFORMILO" ĉi-rilate aparte talentas. Ofte, post tuja tralego de la ricevita "La Informilo", mi ne povis rezisti la emon, komplimenti lin kelklinie pro la "produkto" (laŭ la nuna komerca terminaro)! Sed talento ne sufiĉas! Ni konsciu, ke nia federacia ligilo ne ekzistus sen amaso da persista kaj formika laboro. Ankaŭ tio, mi eĉ emfazus, ĉefe tio garantias al ni ne nur interesan, sed ankaŭ regule aperantan bultenon. Ŝerco -ĉu Pol DENIS povas vivi sen ŝercoj?- li ofte paroligis iun lian avinon kiu, je l' momento de la matenmanĝo, kiam li estis knabeto, avertis lin ankaŭ ŝerco: "Pol, pas de tache quotidienne... sinon avec le petit chapeau!". Mi remetis la ŝerco forlasitan supersignon, ĝuste por akcenti lian "tâche quotidienne"!

Li estu modelo por la juna esperantistaro, modelo de persistemo kaj laboremo, sed ĉiam kun bonhumoro, eĉ humuro!

En la nomo de ĉiuj: koran dankon, Pol!

Edmond LUDWIG

Jen oportuna momento por intervjui nian redaktanton...

E.L.: "Pol, kiel vi iniciatis la aperigon de "La Informilo"?"

P.: - Fakte la bulteno jam aperis post la dua mondmilito, tiam presite kaj laŭ malgranda formato, dank' al S-ano FONDRILLON, poŝtovicisto, kiu uzis (ĉu "oficiale"?...) la maŝinon de la entrepreno. Post lia emeritiĝo zorgis pri plua eldono S-ano CHAPELIER, kiu "stenciligis" la ligilon. Mi "heredis" la laboron simple pro emoj al redaktado kaj pro konscio, ke gravas surloka federacia bulteno. Konfidence, la tiama -kaj daŭranta!- dinamismo de Jean-Paul COLNOT forte impresis kaj stimulis min! Naskiĝis la n°1 de la "nova serio"...

E.: Certe interesus niajn legantojn la teknika flanko de via laboro.

P.: - La skemo estas relative "klasika". Presendaĵoj -aŭ presindaĵoj!- atingas min poŝte (raportoj de kluboj aŭ de izolitaj aktivuloj, kalendaro de la eventoj, gazet-eltondaĵoj, ktp). Mi unue kompilas ilin, provizore flanke lasas kelkajn kaj komencas la tajpadon. Sin sekvis sur mia skribotablo simpla tajpilo, maŝino kun "globetoj" kaj finfine elektronika tajpilo kun ekrano kaj "lekantoj" por diversaj liter-tipoj. Ĝi ebligas nete enkadrigi la tekstojn kaj variigi la prezentadon.

Dum la 2a fazo, multe pli temporaba -sed vere interesiga- mi "makedumas", t.e. mi pripensas kaj prilaboras la aranĝon de ĉiuj tekstoj sur ĉiu paĝo... Ĉi-tie ludas gravan rolon liniilo, ortilo, mezurilo... kaj skrap-gumo! Mia ĉefa "helpanto" tamen estas plej moderna foto-multobligilo kun "zoom-sistemo" (por pli- aŭ malpligrandigi la tajpitaĵojn). Mi menciis la tiel nomatajn "transigebajn literojn", al kiuj oni ŝuldas estetikajn titolojn. Starigas etan problemon la gazet-eltrancaĵoj, kies formato de la kolumnoj neniam taŭgas! Mi do tranĉas, algluas..., -malgluas!-, obeante al la formato postulata de la paĝo.

Poste, OCCE (Office Central de Coopération à l'Ecole) presas la originalojn kaj liveras al mi 3500/4000 foliojn, kiuj devas esti "dis-kaj reordigitaj", tiamaniere ke la numeroj de la paĝoj sin sekvu racie!(longa laboro en kiu partoprenas eksteraj manoj...). Ni atingas la momenton de la "dorso-gluado" (po 500 folioj samtempe). Intervenias specifa glu-pasto kaj varmiga lampo (infra-ruĝaj radioj). Jen la fina enhejma tasko: apartigi ĉiun bultenon el la dors-gluitaj rismoj.

Finfine kunvenas sindonemaj klubanoj por bendigi kaj klasi laŭ departement-kodoj... Simpatia etoso menciinda. Ufo! Plenumite!...

E.: Kiujn malfacilaĵojn vi kelkfoje frontas?

P.: - Sincere dirite, mi ne vidas... almenaŭ teknik-vidpunkte. Se estiĝas kelkaj, mi-mem kulpas!

E.: Certe ne mankas al vi iu "amuzaj" anekdotoj...

P.: - koncerne mian konkretan laboron, jes! Kelkfoje mi daŭre tajpas sen okulumi al la ekrano kaj subite konstatas, ke la karbon-rubando estas eluzita jam de pluraj linioj!... Mi aludu ankaŭ la "koboldojn", kiuj kulpas(?) pri tajp-eraroj, okazigante fuŝan uzon de lingvo-reguloj! Iufoje mi algluis la dekstrajn flankojn de la paĝoj... Aliffoje falis teren la tute ordigitaj folioj! Mi bezonis preskaŭ unu horon por re-ordigi ĉion! Amuzige, ĉu ne? Fakte, iom poste mi senbride ridis dediĉante al mi oportunajn "birdo-nomojn"!!

Malpli plezurigis "anekdotoj": grava, kvazaŭ insult-letero de "eminentulo", al kiu tute ne plaĉis desegnaĵo de ponto unuiganta okcidenton kaj orienton... "La tieaj esperantistoj estas fi-politikistoj! Kun ili ni ne devas havi ian rilaton!". Humura desegnaĵo de Zamenhof elirante el sia tombo por protesti kontraŭ ia "rasismo" (samspeca!) kolerigis iun leganton, kiu rompis sian abonon!

.../...

12 E.: Ĉu vi havas projektojn por la 20 venontaj jaroj?

P.: Tro da! Pri aludi ilin tedus niajn legantojn! Mi menciuj tamen unu: prepari belaspektan "Informilo"-n por la n° 109: **la trimestro 2000!**... kun reliefa kolor-fotoj... kaj specifa pres-arto, kiu ebligis al ĉiu ne-vidanto ŝovi ĉiun paĝon en aparaton por aŭskulti ĉiun tekston... "

=====

oni aktivas ... sur la brèche ...



KURSOJ EN NANCY

La nova kurso por komencantoj startis la 7an de oktobro kun 5 gelernantoj. Poste 2 pliaj aldonaĵoj. Senprobleme nun ni iras nian vojon... La 2a-grada kaj 3a-grada kursoj ek de nun okazas ĵaŭde sed kun nova horaro: de la 18a ĝis la 19a30. Dufoje monate 2a grado alterne kun la 3a grado kun konversacio (kaj eble kantoj). Krome ni provas ankoraŭ funkciigi alian 3a-gradan kurson vendrede posttagmeze (de la 15a30 ĝis la 17a), 2-foje monate.

Nova Turisma Prospekto pri NANCY

Mi memorigas, ke ĝi estas kolora... kaj senpaga! Mendu ĝin al: Turisma Oficejo, 14, Place Stanislas, F-54000 NANCY.

La 1a eldono -1000 ekzemploj- ĵus elĉerpiĝis. La 2a tuj aperos. Multaj mendoj venis el eksterlando aŭ el cetera Francio, neniu el nia regiono...

PERKORESPONDA KURSO

Depost aŭgusto mi dissendis 42 komunikojn al la regiona gazetaro! Mi povis kontroli la aperon de nur 9... Ĝenerale nun la alzaciaj gazetoj sufiĉe regule enpresas, sed sub tre resumita formo. Sekve la komunikoj estas kvazaŭ nerimarkeblaj. Entute mi ricevis 31 informpetojn, el kiuj rezultis 7 aliĝoj al la parola kurso, kaj nur 4 al la perkoresponda. Mi memorigas, ke novaj afiŝoj (eldonitaj de "La Poŝto") kaj prospektoj (eldonitaj de "Telecom") estas je via dispono por diskonigi la P.k^on, kun eventuala aldono pri via propra parola kurso.

Sabataj staĝoj en NANCY

Entute enskribiĝis 9 personoj por 2a-grada kurso kaj 4 por la-grada. La 11an de oktobro mi dissendis cirkuleron al ĉiuj por peti konfirmon kaj mi povis varbi kelkajn pliajn. Ve, nun (5an de novembro), nur 6 personoj sciigis sian konfirmon por la 2a-grada, neniu pri la. Ĉu tiuj staĝoj funkcios? Lastminute: ĉar nur eble 3 aŭ 4 personoj certigis sian partoprenon, tiuj staĝoj ne okazos.

J.-P. COLNOT

MONTARA EKSURSO

Dimanĉe, 27an de septembro, de "Col de la Schlucht" startis grupo da esperantistoj en montara ekskurso. Iniciatoro de tiu evento estis S-r^o COLNOT.

Kvazaŭ laŭ mendo estis bela vetero. Kaj, kvankam malmultis nia grupo, tiu, laŭ kvalite, estis la plej internacia E^o-aranĝo kun 8 partoprenantoj el 4 nacioj (Francio, Japanio, Bulgario kaj Litovio). Ni bone pasigis tempon, surgrimpis la montaron laŭ vojo serpentanta inter rokoj, ĝuis belan pejzaĝon Montaro, arbaro, verdaj valoj... Ĉu povas esti pli bona ripozo por la korpo kaj por la animo?

Al mi precipe plaĉis tiu ekskurso, ĉar en Litovio... ne estas montaro! Por mi tiu ekskurso estis vera konatiĝo kun montaro kaj ebligis pli profundan ekkonon de la beleco de Alzaco.

Je la nomo de ĉiuj partoprenantoj mi kore dankas al S-r^o Jean-Paul Colnot pro la agrable pasinta tago. Pli multe da tiaj ekskursoj!

Algis KASPIRAVICIUS

MIGRADO EN MONTARO

Vi legis ĉi-supre raporton de junulo pri nia migrado en Vogejoj la 27an de septembro. Mi estas maljunulo, kaj kvankam mi iniciatis la ekskurson, mi ne povas konsenti pri la esprimo "bona ripozo por la korpo", ĉar unu monaton poste, miaj kruroj ankoraŭ doloris!.. Fakte, iam, antaŭ pli ol 35 jaroj, mi konatiĝis kun tiu "vojeto de la rokoj". Ankaŭ mi estis juna tiam, kaj kun 3 aliaj esperantistoj ni piede migradis dum Pentekosto. La dimanĉon, de "Bonhoma Pasejo" al Blanka Lago, Nigra Lago, Verda Lago, "Truta" Lago... (ĉiuj lagoj imageblaj!), dum almenaŭ 7/8 horoj... La lundon ni eksupreniris piede de la Munster-valo kaj ni intencis alsupri Hohnekon. Sed ni eraris foje pri la vojo kaj retroviĝis en la "Pasejo de la Rokoj", kiam subite eksplodis fulmotondro. Ni fakte kuris en tiu terura tereno ĝis "Schlucht Pasejo", kie ni celis aŭtobuson por reveni hejmen. Sed la beleco de la loko, eĉ dum la fulmotondro, tiel impresis nin, ke ni decidis reveni tien... dum suna tago! Plurfoje ni denove migradis tien, kaj eĉ ĝis la supro de Hohnock. Nun, de preskaŭ 20 jaroj ni ne revenis... kaj mi kun bedaŭro devis konstati, ke mia juneco estas for!...

Jean-Paul COLNOT

Post la kutima inform-kampanjo (pres- kaj radiokomunikoj, afiŝoj, flugfolioj), kurso por komencantoj malfermiĝis la jaŭdon 7an de oktobro en la klubkunvenejo, 69 Rue Bradfer.

Inter la 5 interesatoj ni plezure bonvenigis du oficistinojn de la loka Turism-Oficejo, Sandrine kaj Marylène. Paralele, denove gvidas kurson oficialan por la staĝanoj de la "Institut des Forces de Vente 55", nia agema sekretario, F.-X. GILBERT, cetere Direktoro de la departementa Komerc- kaj Industriĉambro.

Kalendaro de la jaraj aktivaĵoj estis ellaborita, en kiun ŝoviĝas la monataj klub-kunvenoj (duan merkredon de ĉiu monato).

La Zamenhof-Festo okazos la sabaton 23an de januaro, en Centre Socio-Culturel de Marbot, kun iom ŝanĝiĝita horaro: tagmanĝo kaj distraĵoj dum la posttagmezo por ebligi al "ekster-urbanoj" efike partopreni!

20 personoj ĉeestis la prelegon (kun lumbildoj) de Attilio Rojas, juna studento-profesoro en CORDOBA (Argentino), en salono de la urb-domo, la 3an de decembro. Attilio itineros tra Francio, je la invito de 14 aliaj urboj.

Tre amika komuna tagmanĝo kunigis kelkajn klubanojn en varma etoso.

Estas ankaŭ planita aŭto-ralio je ne ankoraŭ fiksita dato.

MULHOUSE

Laŭ propono de pluraj membroj de nia grupo, ni unuvoĉe konsentis oficialiĝon de "**Mulhouse-Esperanto**", kies sidejo troviĝas ĉe S-in° H. DAMOTTE, 13, Rue Poincaré, 68100 MULHOUSE.

La 6an de oktobro okazis tie nia fondiĝ-kunveno, kiun ĉeestis 9 samideanoj: S-in°j H. Damotte, A. Dreyfus-Miller, A. Mussabini, C. Charton kaj S-r°j A. Grossmann, M. Schlewitz, G. Berthe-Arnaud, R. Kueny, P. Mercier.

Post relegado de la statutoj, du membro-kategorioj estas deciditaj: aktivaj membroj pagas jaran kotizon de 15 F, kaj membroj-subtenantoj pagas 10 F. Sekvas elekto de la komitato kaj proceduro de ĝia renovigo. Jenaj volontuloj estas, per levita mano, elektitaj kiel membroj de la komitato: H. Damotte, A. Grossmann, R. Kueny, M. Schlewitz, C. Charton, A. Mussabini, P. Mercier kaj G. Berthe-Arnaud.

Post lotumado de la komitatanea daŭro, rezultigas, ke dum la ĝenerala kunveno en 1994, la mandatoj de M. Schlewitz, A. Grossmann, G. Berthe-Arnaud estas renovigotaj. En 1995, la mandatoj de la jenaj: P. Mercier kaj C. Charton. Fine en 1996, tiuj de H. Damotte, A. Mussabini kaj R. Kueny.

Elekto de la estraro: Prezidanto: A. Grossmann - Vicprezidantoj: H. Damotte, P. Mercier - Sekretarioj: (por la franca) G. Berthe-Arnaud -

(por Esperanto) A. Mussabini - Kasisto: R. Kueny
Helpantoj: M. Schlewitz, C. Charton.

Marde, la 17an de novembro, ni ĉeestis specialan kunvenon ĉe S-in° Damotte, kiu afable aranĝis festeton honore al nia gvidanto, André GROSSMANN. Jes, li kvindekjariĝis... Ankoraŭ junulo!

En agrabla etoso, la dek ĉeestantoj drinketis je la sano de tiu nelacigebla samideano kaj, kompreneble, amika babilado daŭris pli longe ol kutimaj kunvenoj!

A. MUSSABINI

=====

COLMAR

Ekde oktobro, esperantistoj de la regiono de Colmar kunvenas dufoje monate en Wintzenheim por prepari agadon surlokan. La kunvenejon disponigas al ili Michel BASSO, en la nova sidejo de lia konstru-entrepreno. Alia proponita agado estas la helpo al starigado de fak-asocio pri konstruado kaj arkitekturo. Jam estas prenitaj tutmondaj kontaktoj. Ne mankos la laboro!

E.L.

HAGUENAU

Kiel vi povos legi aliloke, nova pitoreska alzaca urbeto akceptos la partoprenantoj de nia printempa kultura semajnfino. En HAGUENAU ekfloras denove esperantista aktiveco sub la impulso de Sinjoro Charles KRESS, kiu informas nin, pri estiĝo de eta grupo en 1990. Tiam kvar personoj ĉeestis kurson por komencantoj. Tiujare la grupo kreskis. Ses personoj aliĝis al la unuagrada kurso semajna kaj al la kurso por progresantoj.

Nedubeble, la 35a Staĝo de Parolata Esperanto alportos stimulon al la lokaj freŝbakitaj samideanoj!

===== AGADRAPORTO 1992 =====
 DE L'ORIENT-FRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

La Federacio vivas! Tion pruvas la multnombraj lokaj aranĝoj de niaj grupoj (pri kiuj vi povis legi dum la jaro en "La Informilo") kaj la reguleco de niaj staĝoj semajn-finaj.

Sukcesis la printempaj stago kaj ĝenerala asembleo en VILLERS-lès-NANCY, organizataj de Madeleine ROUX. Partoprenis la pola aktoro Jerzy FORMAL. Sukcesis ankaŭ la aŭtuna staĝo en HETTANGE-GRANDE, organizita de Catherine GALLEGRO, kun la partopreno de Profesoro MAITZEN el VIENO. Jam survojas la 35a staĝo kaj ĝenerala asembleo en HAGUENAU, prizorgataj de Odette SCHEIDEL (aparta informo kaj aliĝilo en ĉi-tiu bulteno).

La federacianoj ankaŭ atentigis, ke ilia ligilo, "La Informilo", iĝas pli kaj pli interesa. Jen la rezulto de la konstanta laboro de la ĉefredaktoro, P. DENIS.

Plu prizorgas la **perkorespondan kurson** Jean-Paul COLNOT, kiu gvidas tutan skipon da korektantoj. Saman regulan laboron daŭrigis dum la tuta jaro la respondeculo de nia libro-servo, Roger DEGRELLE, helpata dum la staĝoj de Sinjorino COLNOT. Ŝajnas, ke niaj federacianoj estas legemaj, laŭ la nombro de la venditaj libroj.

Dank' al la rikoltita profito, la federacio povis eldoni duan libron. Temis ĉi-foje pri originala rakontaro de nia federaciano Jean-Louis CLAUDEL, el BRUYERES: "**Avo Fungo kaj aliaj rakontoj**". La eldono estiĝis dank' al la klopodoj de Edmond LUDWIG kaj la pri-informatika talento de André GROSSMANN. Ĉi-lastata zorgis krome pri la kontoj de la federacio, same perinformatike, helpe de la propraj maŝinoj kaj mem-ellaboritaj programoj.

La financoj estas sanaj kaj ebligas nun pli vastan informadon ekster la movado. kunlabore kun UFE, nia federacio dissendas ĉiun duan semajnon, "**La lettre de l'Espéranto**" al radioj, televidoj, gazetoj kaj lernejoj dokumentejoj. Pri la dissendado zorgas Roberto KUENY. Ankaŭ "La Informilo" nun atingas tiujn adresojn.

Por la inform-petantoj, ĉefe pri la perkoresponda kurso, la federacio aĉetis restantan stokon de la speciala numero de "ESPERANTO-ACTUALITES", titolita "Ils apprennent l'espéranto, la plus facile des langues vivantes". Krome, la federacio rajtos represi ĝin, se necesos.

Sume: **aktivaj komitatanoj... ĉu ne?**

Edmond LUDWIG Catherine GALLEGRO
 Prezidanto Sekretario

=====

"HA LO?... LA SIDEJO DE UFE EN PARIZO?..."

- Jes! Saluton!... Pri kio temas?
- Mi veturas al Parizo kaj intencas viziti vin... Ĉu eblas?
- Bonvolu noti:

Nia sidejo, 4bis Rue de la Cerisaie (entrée Rue Jacques Coeur) estas malfermata al la publiko

marde	9/12h	13.30/16.30
merkrede	9/12h	13.30/19.30
ĵaŭde	9/12h	13.30/16.30
vendrede		14.00/20.00

Telefonu tiam, se vi bezonas respondon. Se ne, lasu mesaĝon:

- voĉan sur la registrilo (1)42 78 68 86
- skriban ĉe monitoro "Minitel" tra 3612

Ne forgesu klare literumi vian nomon kaj vian adreson.


Informoj ankaŭ riceveblaj per "Minitel" 3615 ESPERANTO
 aŭ 3614 PING (pli malmultekoste sed nur por E°-fluparolantoj)




24h. sur 24

=====

35^{ème} Stage Pratique d'Espéranto Parlé

SAMEDI, 27
 et **DIMANCHE, 28 mars 1993**
 "Maison Saint-GERARD"
 11, Route de Wintershouse
 C-67500 HAGUENAU
 **88 93 83 27**



La Fédération Culturelle France-Est pour l'Espéranto, membre de l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO -association culturelle sans but lucratif, agréée par le Ministère de l'Education Nationale- invite les habitants de HAGUENAU et de sa région, d'Alsace et de Lorraine, à venir s'initier à la **PLUS FACILE DES LANGUES VIVANTES, L'ESPERANTO.**


Ce cours d'initiation permettra aux personnes curieuses de l'Espéranto de découvrir le fonctionnement de la langue internationale, **en la pratiquant** dès les premières séquences de ce stage et en passant une fin de semaine en compagnie d'espérantophones français et étrangers.

Horaires des cours: samedi après-midi 15h à 18h30 par périodes de 45 minutes.
 dimanche matin 9h à 12h -même rythme-

Un concert original par la "Société de musique MANDOLINATA" de HAGUENAU distraira les stagiaires le samedi soir. Dimanche après-midi: visite guidée de la ville (2h) ou du musée (2h)

Le stage se déroulera à la "Maison d'Accueil Saint-Gérard", 11, Route de Wintershouse, 67500 HAGUENAU

Prière d'adresser le bulletin d'adhésion ci-dessous (avec le règlement de **votre adhésion**) à

Madame Odette SCHEIDEL
 35, Grand'Rue
 67660 - BETSCHDORF
 **88 54 45 02**

(* le manuel d'initiation commandé, "Metodo 10", -voir ci-dessous- sera fourni sur place)

Chèques au nom de Mme O. SCHEIDEL

Date limite d'envoi: 20 mars 1993

FRAIS DE PARTICIPATION

<u>Adhésion au stage</u>	cotisation + abonn ^t à "La Informilo" + Metodo 10*			
adulte	189 FF	(120 FF +	45 FF	+ 24 FF)
moins de 18 ans	109	(40 +	45	+ 24)
entre 18 et 25 ans	149	(80 +	45	+ 24)

Pension complète (une nuitée + petit déjeuner + repas samedi soir et dimanche midi):

à régler sur place ←

- chambre individuelle 285 FF
- chambre à 2 lits 240 FF

Restauration simple (sans chambre)

- repas (samedi soir) 62 FF
- (dimanche midi) 70

BULLETIN D'ADHESION



cocher les cases concernées

M. Mme Mlle **Nom et prénom**

Adresse

participera au stage proposé. Choisit la formule **pension complète** et réserve

restauration simple et réserve

- repas (samedi soir)
- repas (dimanche midi)

— lit(s) dans une chambre
 à 1 2 lit(s)
 (éventuellement: à partager avec)

Visite guidée de la ville du musée
 (à choisir!)


Date: Signature:

Joint à ce bulletin le montant de son adhésion.

35a Staĝo Praktika de Parolata Esperanto

SABATON, la 27an
kaj **DIMANĈON**, la 28an de marto 1993

"Maison Saint-GERARD"
11, Route de Wintershouse
F-67500 HAGUENAU

 88 93 83 27



En HAGUENAU la Esperanto-agado viglis inter la du mondilitoj: granda grupo praktikis la lingvon kaj informis pri ĝi. En la urbo ekzistas strato "Esperanto". En la jaro 1935 instruis tie Lidja, filino de Doktoro ZAMENHOF. Bedaŭrinde granda parto de la grupanoj mortis en koncentrejo...

Antaŭ unu jaro, nova grupo naskiĝis. Nia staĝo kuraĝigu ties membrojn por estonta agado!

La kursoj, tranoktado kaj manĝoj okazos en tutmoderne ekipita Kultur-Centro, 10 minutojn piede el la stacidomo. Komfortaj salonoj kaj specifaj instalaĵoj estos je nia dispono.

La kutimaj 3 diversnivelaj kursoj ebligas al ĉiu konatiĝi kun la Internacia Lingvo aŭ poluri siajn jam akiritajn sciojn. Por la flueparolantoj, Georges LAGRANGE gvidos seminarion pri la vivo kaj verkoj de Gaston WARINGHIEN. Se la multfaceta persono de tiu "giganta tuŝulo" indas je miriga esploro de lia longa vivo kaj de la abunda ĉiutema verkaro lia, la klereco, la veruvo... kaj la nel-ĉerpebla humuro de Georges LAGRANGE certigas enhavriĉajn horojn al la seminarianoj!

PROGRAMO

Sabatono, 27an de marto

... ek de la 13a30: akcepto de la partoprenantoj

15a/18a30: diversnivelaj 45-minutaj kursoj kaj 15 minutaj paŭzoj

Kurso A1 (komencantoj)

"METODO 10" - Gvidanto: Edmond LUDWIG

Kurso A2 (progresantoj kaj lernantoj de la "perkoresponda kurso")

"AMUZA LEGO-LIBRO" - Gvidanto: Robert KUENY

Kurso B (praktikantoj)

"METODO 15" - Gvidanto: Jean-Paul COLNOT

Seminariono D (flueparolantoj)

"Vivo kaj verkaro de Gaston WARINGHIEN"
Gvidanto: Georges LAGRANGE

18a30: **Libro-servo** (senmodere elĉerpinda!...)

19a15: **komuna vespermanĝo**

20a30: **Distra vespero...**

Ni frandos originalan koncerton de la famkonata muzika societo "MANDOLINATA" de Hagenau

(dum la paŭzo...: "Surprizo"!)

Dimanĉono, 28an de marto

...ĝis la 9a: **matenmanĝo**

9a/12a: kursoj laŭ la sama ritmo

12a30: **Komuna tagmanĝo**

Posttagmeze: "Esploro" de la pitoreska urbo
(2 horojn - sperta gvidado)

aŭ vizito de muzeo (2 horojn)

PARTOPRENO-KOSTOJ

Aliĝ-kotizo (samtempe sendenda kun via aliĝ-slipoj)

= Abonantoj de "La Informilo"	120 FF
= Ne-abonantoj:	165 *
= Junuloj ĝis 18 jaroj:	40
" de 18 ĝis 25 jaroj:	80

(* ricevos "La Informilo"-n dum la tuta jaro)

Kompleta pensiono (tranokto, vespermanĝo sabata, maten- kaj tagmanĝoj dimanĉa):

= En du-lita ĉambro:	240 FF-	En unu-lita:	285
= Nur sabata vespermanĝo:	62		
= Nur dimanĉa tagmanĝo:	70		

La ĉi-suban aliĝilon vi sendu nepre antaŭ la 20a de marto 1993

al

Sinjorino Odette SCHEIDEL
35, Grand' Rue
F-67660 BETSCHDORF
 88 54 45 02

(aldonu vian ĉekon je la nomo de O. SCHEIDEL)

35a STAĜO de PAROLATA ESPERANTO
27/28ajn de marto 1993

ALIĜILO

"Maison d'Accueil St-GERARD"
11, Route de Wintershouse
F-67500 HAGUENAU

S-r^o S-in^o NOMO:

Antaŭnomo:

Mi elektas la "kompletan pensionon", sekve...

Adreso:

... Mi rezervas ___lito(j)n en unu- du- lita ĉambro (eventuale) Mi ĉambroloĝos kun

Mi partoprenos la kurson **A1** **A2** **B**

Mi ne tranoktos sed mendas

la seminarion **D**

___ sabata(j)n vespermanĝo(j)n

(elektu!) la urbo-viziton


___ dimanĉa(j)n tagmanĝo(j)n

la muzeo-viziton

Mi aldonas mian aliĝ-kotizon (ĉeke)

Dato: Subskribo:

→ (Eksterlandanoj pagu surloke!)



85a FRANCA KONGRESO DE ESPERANTO en P A U
En Majo 1993 de la 8-a ĝis la 11-a de Majo 1993

KOTIZOJ (en francaj frankoj)	Ĝis la 31.1.93		Ekde la 1.02.93	
	membroj	ne membroj	membroj	ne membroj
kongresan(in)o	225	245	240	260
geedzoj	370	380	385	395
junuloj (sub 30 jaroj)	155	175	165	185
Eksterlandanoj	senpage		senpage	

Taga aliĝo surloke : 120 F

Aliĝilo

Nomo : _____

Antaŭnomo : _____

Adreso : strato _____

urbo _____ poŝtkodo _____

Dato : _____ subskribo _____

Mi kunmetas ĉekon de F laŭ ĉi-supra tarifo.

ATENTU ATENTU : Faciligu nian preparon. Sendu frue vian kotizon, kun la aliĝilo (tiun folion eltiru, aŭ fotokopiu) kaj ĉekon al la sekvanta adreso:

ESPERANTO FRANCE (aŭ U.F.E.) / NACIA KONGRESO
4 bis rue de la Cerisale 75004 PARIS

ALIĜILO

VALENCIO

78-a

78-a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
24-31 julio 1993
Valencio, Hispanio

Konstanta adreso: 78-a UK de Esperanto
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Poŝtĝira konto: 62 73 37 (Centralo Den Haag)
Bankkonto: ABN-Amro Bank, Rotterdam 42.69.01.444
Adreso de LKK: 78-a UK de Esperanto
G. V. Fernando el Católico 45ª, E-46008 Valencia

Kongresa numero: _____

ĈIU ALIĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON, FOTOKOPION AŬ SAMFORMATAN PAPERON - BONVOLU TAJPI AŬ SKRIBI PRESLITERE. LAŬBEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN.

FAMILIA NOMO VIRO/VIRINO
(por alfabeto ordigo) (forstreku unu)

PERSONA NOMO UEA-KODO [] [] [] - []

ADRESO (naciĝinge en latinaj literoj kun poŝtkodo)

LANDO TEL. N-RO (kun prefikso)

PROFESIO / FAKO

ŜATOKUPO NASKIĜDATO

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko;

- mi sendas ĉi tiun aliĝilon al mia landa peranto kaj samtempe pagas al tiu.
- mi sendas ĉi tiun aliĝilon al la CO en Roterdamo kaj pagas laŭ suba specifo:
- al ABN-Amro-konto n-ro 42.69.01.444 en la nomo de la UK (aldonante 20 gld.).
- al ĝiro-konto n-ro 627337 en la nomo de la UK (aldonante 11 gld.).
- per etroĉeko/poŝtmandato al la adreso de la UK en Roterdamo.
- per ĉeko favore al UK de Esperanto (aldonante 25 gld.).
- al la poŝtĉekkonto de UEA en*
- el mia UEA-konto, kie estas sufiĉa kredito (bonvolu debeti tien).

* Eblas pagi al kiu ajn alilanda konto de UEA (vidu en la Jarlibro kaj en la revuo *Esperanto*).

Mi legis, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn sur ĉi tiu aliĝilo.

DATO SUBSKRIBO

Por uzo de la administracio / peranto:		KOTIZO (vidu dorso)
uea-membro en kategorioj/jaro		ADOPTA KASO
konfirmo de peranto:		BLINDULA KASO
konfirmo de CO:		TRIAMONDA KASO
PAGO EN CO	KONFIRMO	LITERATURA KASO
notoj		DONACO (ĝenerala kaso)
		ADOPTAJ GEPATROJ
		KOSTOJ (11/20/25 gld.)
		ENTUTE (en guldenoj)

Se vi aliĝas kiel kunulo, bv. ĉi tie indiki la nomon/kodon de la ĉefaliĝinto:

Se vi aliĝas kiel handicapulo, ĉu UEA jam havas atestilon? jes / mi kunsendas (forstreku unu)

Se vi aliĝas senpage, bv. skribi ĉi tie la kialon (vidu dorso):

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ la jena grupigo:

A: Ĉiuj landoj escepte de tiuj menciitaj ĉi-sekve sub B;

B: Albanio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, antaŭa Jugoslavio, Rumanio, Pollando, antaŭa Sovetunio; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko kaj Latina Ameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto (vidu liston en la Unua Bulteno).

La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 1993.

FOR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. ATENTE RELEGI LA ĈI-SUPRAJN KLARIGOJN.

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ: (ĉiuj en nederlandaj guldenoj)	ĝis 92 12 31 1-a periodo		ĝis 93 03 31 2-a periodo		ekde 93 04 01 3-a periodo	
	A	B	A	B	A	B
1. ne individua membro de UEA	263	197	330	246	393	295
2. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	210	158	263	197	316	236
3. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA:	158	118	197	148	236	178
4. kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA	105	79	131	98	157	117

Priatentu: la ĉi-supraj kotizoj estas donitaj en **guldenoj**.

DIFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T) en la jaro en kiu oni pagas la kongreskotizon. *Ne temas pri Aligitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).*

Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

Junulo: Tiu, kiu naskiĝis inter 63 01 01 kaj 72 12 31 (inkluzive). Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo postulas akompananton, kaj kiu pruvis tion per kuracista aŭ simila atestilo.

Senpage aliĝas:

- infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 73 01 01;
- nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.

Karavanaj aliĝoj: Grupo de minimume 25 personoj rajtas aliĝi kontraŭ 90% de la kotizo en kat. I de la koncerna aliĝperiodo, eĉ se ili ne estas individuaj membroj de UEA. Karavana aliĝo eblas nur por landogrupoj A. Petu plian informon ĉe la Konstanta Adreso.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO.

Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

Kongresa Regularo (ekstrakto): "7. Kongresanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK." Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton por la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalajn Kongresojn.

Se vi pagas al peranto, bonvolu sendi ankaŭ la aliĝilon al tiu.
Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.

universala kongreso en VALENCIO Hispanio

KongresKotizoj tra U.F.E. Ĉiuj en francaj frankoj (validas nur por francoj)	ĝis la 31/12/92 1-a periodo	ĝis la 31/03/93 2-a periodo	ekde 01/04/93 3-a periodo
1 NE individua membro de UEA	816 F	1025 F	1220 F
2 individua membro de UEA ne inkluzivas MG	652	816	980
3 kunulo/junulo/handikapulo NE individua membro de UEA	490	612	733
4 kunulo/junulo/handikapulo MEM individua membro de UEA	326	407	489

Bonvolu atente legi la difinojn de kategorioj sur la aliĝilo mem.

ESPERANTO-FRANCE
(Nacia Kongreso)

4bis, Rue de la Cerisaie,

F - 75004 PARIS

- KONGRESEJO - AKCEPTEJO :

CENTRE INTERNATIONAL de SEJOUR (C.I.S.)

1 place de l'Europe. 14200 HEROUVILLE

Saint CLAIR. Tél.: 31.95.41.00.

Rektaj busoj : CAEN SNCF Stacidomo / Hérouville
urbocentro. C.I.S. situas apud urbodomo.

- LOĜADO :

→ C.I.S. : Prezoj po persono, nokto
+ matenmanĝo.

→ HOTELOJ : Vi bonvolu mem kontaktiĝi :

☆ ESPERANCE HOTEL , Bord de Canal,
14200 Hérouville. Tel. : 31.44.97.10.

ĉambro 1 persono : 140 F.

ĉambro 2 personoj : 170 F.

+ matenmanĝo : 28 F.

☆ HOTEL BALLADINS 14200 Hérouville
av. Gén.de Gaulle. Tel.: 31.47.40.00.

ĉambro 1 aŭ 2 personoj : 219 F.

+ matenmanĝo : 28 F.

→ KAMPADEJO : Vidu la informon sur la
buĵeno de la Asocio : " SAT-AMIKARO ".

- DUONTAGAJ EKSURSOJ :

□ S.M.1. : 8h30 - 13h00. FREINET lernejo.
(konfirmota !).

□ S.M.2. : 8h30 - 12h30. Kunportu botojn,
varmajn vestaĵojn, binoklojn. Organizota
fare de ornitologia asocio normanda.

□ S.M.3. : Laŭlonge de la kanalo ĝis la maro.
25 km. iro/reiro. Kunportu viajn biciklojn.
Ili estos en sekura loko dum la kongreso.
Ebleco de luado surloke. (Ne multaj !)
9h00 - 12h30.

□ S.P.3. : Vizito de la ejo de asocio pri radio-
aktiveca detekto : "ACRO".

□ S.P.4. : CITIM : regiona asocio pri "tiers-monde".
agado.

- TUTTAGA EKSURSO :

MARDE : Vizito de la MONT SAINT MICHEL abatejo
iro + reiro, aŭtobuse + tagmanĝo en restoracio
entenata. Reveno en Caen stacidomo kaj Hérouville
C.I.S. je la 18a horo.

- KONGRESTEMO :

EUROPO 93 : AL KIA EUROPO ?

(Ni ne voĉdonos por aŭ kontraŭ Maastricht !)

☆ - Kiun rolon ludos la orienta parto de la
kontinento ?

☆ - Rigardo de la Tria Mondo al Eŭropo.

☆ - ĉu Esperanto taugas al Eŭropo,
ĉu Eŭropo taugas al Esperanto ?

- KULTURA PROGRAMO :

Por la LOĜANTOJ de la URBARO :

☆ - Ekspozicio pri Esperanto dum 2
semajnoj en la urba biblioteko.

☆ - Tuta semajno kadre de la kinejo " le
Café des Images " pri " Kinoarto
kaj Esperanto.

Dum la KONGRESO :

☆ - SABATE : - vizitoj en CAEN.
- vespero kun kulturaj
asocioj de HEROUVILLE.

☆ - DIMANĈE :
- " KAJTO " Esperanto -
Muzikgrupo.



- INFANA KONGRESETO :

Profesia edukista urba teamo zorgos pri la
infanoj. Ili ĝuos propran programon.

La prezoj inkluzivas asekuron, sed ne la manĝojn.
La infanoj malpli ol 15j. ne pagas kongreskotizon,
sed pagas 60 F. por la tuta restado, se ili ĝin
partoprenas.

- Por PLIAJ INFORMOJ :

YVES NICOLAS , 17-37 Quartier du Bois,
14200, HEROUVILLE St CLAIR. Tél. : 31.95.11.81.
(Preferinde lunde vespere).

(Supplément au n° 476 de SAT-AMIKARO
NOV. 1992 . CPPAP n°56121.

Directeur de la publication : J. Selle)

ESPERANTO

HEROUVILLE SAINT CLAIR
invitas vin partopreni en la

48a KONGRESO de SAT-AMIKARO

de la 9a ĝis la 13a
Aprilo 1993.



Centre International de Séjour.
HEROUVILLE St CLAIR.

ATENTU FRUE ALIĜU !

kaj pagu la tuton se vi deziras
ke la O.K.K. plenumu ĉiujn viajn
kongresdezirojn, ĉar pro la limigo
de ĉiu loĝkategorio, la O.K.K.
eble devos proponi alternativon
al via elekto .

*POST la 15a de JANUARO 93
Kotiz-artigo : 50 F.F. por ĉiuj*

KONGRESALIĜILO

ANTAŬ OL PLENIGI LA ALIĜILON, BONVOLU LEGI LA INFORMOJN ĈE LA DORSO. SKRIBU PRESLITERE TIU KIU ALIĜAS TUJ PAGU LA TUTON. DANKON, OKAZE DE NEPARTOPRENO, LA O.K.K. REPAGOS ĈION ESĈEPTE

La 1a de
MARTO.

DE LA ALIĜIKOTIZO, NI NE POVOS GARANTII LA REPAGON DE LA MANĜOJ KAJ DE LA LOĜADO OKAZE DE NULIGO POST :

	FAMILIA NOMO :	ANTAŬNOMO :	AĜO :	SEKSO	KURSO GRUPO *
(1) :					
(2) :					
(3) :					
(4) :					
(5) :					

ADRESO :

POŝTKODO :

URBO :

TELEFONO :

LANDO :

* Se vi deziras sekvi kurson, nou en tiu grupo vi partoprenos. :

K1 : Vera komencanto. - K2 : Falsa komencanto. - K3 : Progresanto.

NI ALVENOS : * Forstrekta la nevalidajn respondojn.

: TAGO de la ALVENO. - HORO :

: TAGO de la FORIRO. - HORO :

* AŬTE aŭ TRAJNE aŭ NI BEZONAS : (Nombro) fervoja(j)n-SNCF rabatilo(j)n

KOTIZOJ :	PREZO:	personoj	SUME :
Kongreskotizo por - 15 j. = 0,00 F.			
(1) - SAT-AMIKARO - KOTIZO	160,- F.		
(2) - " - d° - ĝis 25 j.	80,- F.		
(3) - KONGRESKOTIZO, NE MEMBRO	200,- F.		
(4) - " - d° - MEMBRO de SAT-AMIKARO	150,- F.		
(5) - JUNULO ĝis 25 j. / FAMILIA MEMBRO	75,- F.		
(6) - INFANKONGRESETO	60,- F.		
(7) - SUPLEMENTO : Kotizaltigo post la 15a de januaro :	50,- F.		

MANĜOJ :	PREZO:	Manĝoj	personoj
TAG- kaj VESPERMANĜO :			
(1) - PLENSKRESKULOJ	50,- F.		
(2) - INFANOJ 6 ĝis 12 j.	42,- F.		
(3) - INFANOJ MALPLI OL 6 j.	30,- F.		
<input type="checkbox"/> ★ NI DEZIRAS MANĜI VEGETARANE.			

LOĜADO :	PREZO:	Noktoj	personoj
C.I.S. (NOKTO + MATENMANĜO) :			
(1) - Unulita ĉambro + duŝo : *	130,- F.		
(2) - Dulita ĉambro + duŝo : *	100,- F.		
(3) - 5/6 lita ĉambro + lavotablo	70,- F.		
* Nur je la dispono de la unuaj mendontoj !			
★ Mi estas sola kaj deziras loĝi kun			

DUONTAGAJ EKSURSOJ :	PREZO:	personoj
★ SABATE MATENE.		
(Kodo : S.M.): ★ S.M.1. : - FREINET LERNEJO	senpage	
★ S.M.2. : - BIRDA PARKO	50,- F.	
★ S.M.3. : - BICIKLA PROMENADO	5,- F.	
★ S.M.4. : - VIZITO de la HEROUVILLE-VIDINDAĴOJ:	senpage	
★ SABATE POSTTAGMEZE. (Kodo : S.P.):		
★ S.P.1. : - VIZITO de la CAEN-KASTELO + CENTRA URBO:	35,- F.	
★ S.P.2. : - ABATEJO de la "DAMOJ" + CENTRA URBO:	35,- F.	
★ S.P.3. : - A.C.R.O.	25,- F.	
★ S.P.4. : - C.I.T.I.M.	25,- F.	

TUTTAGA EKSURSO:	PREZO:	personoj
(MARDE) Mt St MICHEL	180,- F.	
♡ LIBERVOLA MONDONACO:		
◇ KONGRESMARKOJ MEMGLUEBLAJ: (Ekz. sur la frontpaĝo) 32-ope	10,- F.	

DATO:..... SUBSKRIBO:

SUME:

VI KONSERVI KOPION de TIU-ĈI ALIĜILO. Bonvolu de nun pagi la tutan sumon.

Plenigu vian ĉekon je la nomo "HEROUVILLE ESPERANTO CONGRES"

CCP ROUEN n° 1673.05.G. kaj sendu la tuton kun afrankita leterkoverto + via adreso al Pierre QUILLAUD 16 rue du Lieutenant de Vaisseau PARIS 76120 GRAND QUEVILLY.

Ensendu antaŭ la 10a de MARTO ĉe la O.K.K.

Por la triagrada ekzameno (atesto pri Kapableco)

Por la duagrada ekzameno (atesto pri praktika lernado)

KANDIDATOJ :

notende

prenez note



pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...



➔ **nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...**

sur via not-kajero

35a Staĝo de Parolata E°
27/28ajn de marto 1993
F-67500 HAGUENAU

85a Kongreso de UFE
8/11ajn de majo 1993
PAU

35a Staĝo de Parolata E° ☆
F-67500 HAGUENAU

27/28ajn de marto

Odette SCHEIDEL
35, Grand' Rue
67500 HAGUENAU

9a Printempa Semajno ☆
Internacia

9/16ajn de aprilo

Wolfgang BOHR
Johannes-Kirschenweg-Str. 11
D-5483 BAD-NEUENAHN-ADRWEILER

48a Kongreso de SAT-Amikaro ☆
F-14200 HEROUVILLE-St-CLAIR

9/13ajn de aprilo

P. QUILLAUD
16, Rue du Lt-de V. Paris,
76120 GRAND-QUEVILLY

"ANTWERPEN 93" ☆
Internacia Renkontiĝo
...kaj de la Moza Valo

23/25ajn de aprilo

Flandra E°-Ligo
Frankrijklei 140,
B-2000 ANTVERPEN

41a Kultura Semajnfino SEL ☆
Kardinal-Wendel-Haus
D-6650 HOMBURG

7/9ajn de majo

S.E.L.
Querstr. 11,
D-6607 QUIERSCHIED

85a NACIA ESPERANTO-KONGRESO ☆
de U.F.E.
F-64000 PAU

8/11ajn de majo

ESPERANTO-FRANCE
4bis, Rue de la Cerisaie
75004 PARIS

"ANTWERPEN 93" ☆
Internacia Kultura Semajno

16/23ajn de julio

(adreso ĉi-supre)

OSIEK - KONFERENCO ☆
H-KONDOROS

17/24ajn de julio

Eric LAUBACHER
1, Rue des Vosges
F-78180 MONTIGNY-le-
BRETONNEUX

78a UNIVERSALA E°-KONGRESO ☆
de U.E.A.
E-VALENCIA

24/31ajn de julio

ESPERANTO-FRANCE
(adreso ĉi-supre)

TEJO-KONGRESO ☆
BG-3000 VRACA

7/14ajn de aŭgusto

J.E.F.O.
4bis, Rue de la Cerisaie
F-75004 PARIS



Informoj kaj datoj pri la kultur-eventoj kaj renkontiĝoj en la
staĝejo "Kvinpetalo" (F), "Kultura E°-Domo" Grésillon, kaj
pri la **monda kongreso de SAT** aperos en nia venonta n° (81).

=====

por viaj jarfinaj festoj...

Koktejlja "ESPERANTO" recepto

Sur glacikubon, en grandan glason,
enverŝu 7 partojn da aperitivo "Suze"
kaj 1 parton da likvoro blua kuracao.

Je via sano sed... moderece trinku!

(nepagita reklamo de R. Boré, F-73000 CHAMBERY)

("kobaj"-testudo senpermeso "ŝtelita" ĉe GEJ-Gazeto)

mi frandu
senprokraste
tiun eliksiron!

mi ĉiam
malfacile en-
kapiĝas al mi
la adverbojn!

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA (KCE)
Poŝtfako 779, CH-2301 LA CHAUX-de-FONDS

... sed notu jam de nun:

FINMONATAJ STUD-SEMAJNFINOJ EN 1993

Kultura Centro Esperantista (KCE) ofertas krom la tradiciaj semajnaj staĝoj ankaŭ buntan semajnfinan programon por la jaro 1993, kiu ebligas laŭplaĉan kaj flekseblan partoprenon. La aranĝoj okazas samtempe kaj paralele en formo de kursoj A, B kaj C. La kursoj okazas fine de ĉiu monato kaj strukturigas jene:

Datoj: januaro 30/31; februaro 27/28; marto 27/28; aprilo 24/25; majo 29-31; junio 26/27, julio 24/25; aŭgusto 28/29; septembro 25/26; oktobro 30/31; novembro 27/28; decembro 25-januaro 02.

Kurso A: por komencantoj

Enkonduko en la lingvon Esperanto kun klarigoj pri la Esperanto-movado.

Instruas: Sonja Brun, Jean-Jacques Lavanchy, Andres Bickel, k.a.

Kurso B: por progresintoj

Por partoprenantoj, kiuj komencis lerni Esperanton kaj kiuj ŝatus progresi en ĝi, aŭde, lege kaj parole. Oni faras gramatikajn kaj strukturŝanĝajn ekzercojn, legas facilajn tekstojn kaj konversacietas. Kaj la instruisto pretas respondi al ĉiuj viaj lingvaj demandoj.

Instruas: Mireille Grosjean, Claude Gacond, Andy Künzli, k.a.

Por kursoj A kaj B bv. peti detalan informon ĉe KCE.

Kurso C: por lertuloj

Por partoprenantoj, kiuj jam bone konas la lingvon

Esperanto, t.e. kiuj precipe povas sufiĉe bone kompreni ĝin aŭde. Kutime tiu ĉi kurso proponas konkretan temon, priesperantan aŭ ne-priesperantan, en formo de interesa prelego kun aldona diskuto.

1993 januaro 30/31

Herbert MAYER, (Aŭstrio): La eldonejo 'Pro Esperanto' (Vieno) - ĝiaj agadoj, verkoj kaj aŭtoroj.

1993 februaro 27/28

François DEGOUL (Francio): Homaranismo - la idealo de Zamenhof.

1993 marto 27/28

Claude GACOND (Svislando): Tra la Esperanto-literaturo per specimenaĵoj: verkistaj kaj tempaj karakterizoj.

1993 aprilo 24/25

Tazio CARLEVARO (Svislando): Interlingua kaj naturalismo en planlingvo.

1993 majo 29-31

Luigi BARBANA (Italio): En arbaro kun arbaristo. Akompane de Claude GACOND (Svislando).

1993 junio 26/27

Claude PIRON (Svislando): temo anoncota.

1993 julio 24/25

Tomasz CHMIELIK (Pollando): Edmond Privat, fama svisa ĵurnalisto kaj esperantisto. Lia defenda agado favore al etnoj, interalie la Poloj.

1993 aŭgusto 28/29

Seminario: Edukado al pacaj rilatoj interkulturaj kaj interpopola konduto.

Gvidas: Mireille GROSJEAN (Svislando).

Por bone servi vin, estas ĉiam grave por ni, ke via aliĝo alvenu sufiĉe FRUE ! De ĝi dependas la ĉambraj disdonoj kaj manĝaj aĉetoj.

Sekretario: Patricia Sarica

50, rue Haute F-57210 FEVES Francujo

OSIEK-PREMIO 1992



Ebbe VILBORG, krokizo de
Megumie KOMAMURA (el LG41)

Ĉijare la OSIEK-anoj proponis 7 librojn premiindajn, prezentitaj en *La gazeto* n-ro 41 (15junio92). La 23an de julio 1992, dum la Internacia Esperanto-konferenco en Ateno (Grekujo), per duobla sekreta voĉdonado, la OSIEK-premio estis atribuita al

Ebbe VILBORG

pro lia verko

Etimologia vortaro de Esperanto

kies tria volumo aperas ĉiaŭtune. La premio, kies nuna valoro estas 300 ekuoj, estas laŭstatute rekompenco al verko ne beletra.



**ESPERANTO-KONFERENCO
EN HUNGARIO
KONDOROS
17-24 JUL 93**

temo
**KIAL PAROLI
ESPERANTON ?**

programo
PRELEGOJ, DEBATOJ

**KURSOJ
OSIEK-PREMIO
SIMPOZIOJ
TEATRAĴOJ, DISTROJ
LIBROSERVO**

24-27 julio
**TRI TAGOJ EN
BUDAPEŝTO**

informoj, aliĝoj
Eric LAUBACHER
1, rue des Vosges
F-78180 MONTIGNY-LE-
BRETONNEUX
Francujo
tel. (1) 30 96 67 91

LA GAZETO

mondkultura
sendependa
esperantisma

PETU PROVINUMERON DE
LA GAZETO
55210 CREUE, FRANCO

abono
140 FF

"La Gazeto"
55210 CREUE

REVUOJ KIES PERADO ESTAS PRIZORGITA DE NIA FEDERACIO

★ LITOVA STELO 6 numeroj pojare, eldonita de Litova Esperanto-Asocio. Riĉa enhavo kun literaturaj tekstoj ofte pri la litova kulturo kaj pri la freŝe liberigita lando. 60 FF


★ TUTMONDAJ SCIENCOJ KAJ TEKNIKOJ eldonita de Esperanto-Asocio Academia Sinica el Pekino Ĉinio 60 FF

Bonvolu ĝiri la koncernan sumon al la poŝtĉekkonto de nia Federacio:
FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO PCK 1997 72W NANCY
Aŭ rekte per bankĉeko al mia adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des
Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio

INICIATO PRI INFORMADO

Orient-franca Esperanto-Federacio partoprenas en la sukcesaj klopodoj de UFE priinformado, por regionnivela plusendo de la du-semajna "**La lettre de l'Espéranto**". Ĝin ricevos regionaj gazetoj, radioj kaj televido, same kiel regionaj dokumentejoj de la Nacia Edukado.

Pri la servo zorgas Roberto KUENY, de la grupo de Mulhouse.



HAGUENAU Alzaco

iom
pri la pratempo... ☆




HAGUENAU naskiĝis en ombro de l' kastelo konstruita de "Frederiko Unuokula" -patro de "Frederiko Ruĝbarba"- ĉirkaŭ 1115. Dank' al larĝe donemaj familioj Hohenstaufen, Barberousse kaj Frederiko la IIa interalie, kiuj punkte rezidis ĉi-tie ĝis 1250, la komunumo ekĝuis prosperon. Administranta sidejo de la riprezentanto de la imperiestro en Alzaco, la urbeto fariĝis ĉef-loko de la "Dekapolo" kreita en 1354. Pri tiu tiama brila periodo atestas la postrestantaj preĝejoj St-Georges kaj St-Nicolas.

Sed la "Tridekjara Milito" malfermis nigran jarcenton, dum kiu Haguenau grave suferis. Duobla incendio en 1677 detruis la imperian kastelon. Post 1715 denove ekfloras la urbeto. Kiel Strasburgo kaj Colmar ĝi impresas pro siaj konstruaĵoj el la 18a jarcento. Ekde tiam ĝi iĝas grava komercocentro, eksportante la ĉirkaŭajn kamparajn produktojn (lupolo) kaj profitante imponan arbaron, kiun ĝi jam posedis en nedivideco kun la imperiestro ekde 1434, kaj poste samstatute kun la franca ŝtato... ekde 1648!

Germanaj trupoj okupis la urbon inter 1940 kaj 1944. Bataloj okazantaj sur la milit-linio Moder damaĝas la urbon je la fino de la konflikto. La jaro 1950 signas la efektivan starton de rekonstruado kaj disvolviĝo.


Nuntempe Haguenau aparte zorgas pri sia "fameco-bildo" dank' al novaj konstruaĵoj aŭ modifoj por plibeligi la urbon. Samtempe ĝi fariĝis altira industria centro, kiu ĉefrolas en Alzaco.



Maison Saint Gérard
II^{te} rte Wintershouse
67500 Haguenau

☎ 88 93 83 27

nia stagejo...



necesejo, duŝkabino kaj telefono
en ĉiu ĉambro

5 kunven-salonoj = allogaj manĝo-salonoj

6 unulitaj ĉambroj = 36 dulitaj ĉambroj

faciligita aliro
por surfotelaj handikapuloj:

2 liftoj = 6 specife ekipitaj ĉambroj



POUR UN ESPERANTISTE
LA "JOURNEE DU LIVRE"
DURE TOUTE L'ANNEE!

LIBRO-SERVO
12, Rue E. d'Orves
F-54490 PIENNES

Kio estas Esperantisto, kiu nek aĉetas librojn kaj nek legas? Jes, kia esperantisto li estas?

Jen la jarfinaj festoj!... Oportuna okazo por plezurigi via(j) korespondanto(j)n, amikojn en nepagipovaj landojn... aŭ vin-mem!

uz-modo :

Simpla mendo-poŝtkarto.
Baldaŭa libropakaĵo
kun interna fakturo via
kaj danko anticipa
pro via pago tuja!

konsumu senmodere!
nenia veneno ene...!



Avo-Fungo kaj aliaj rakontoj

8 originalaj rakontoj de nia samideano
Jean-Louis CLAUDEL.

Malicaj buboj petolas tra la vogeza kam-
paro, dum la pliaĝuloj foje ŝerce, foje mal-
ĝoje, vivas sian vivon en epoko, kiam la mo-
derno ankoraŭ ne tro modernis!

33 paĝoj da spriteco kaj nostalgio.

Unu ekzemplero	30 FF
Inter 3 kaj 10 ekz.	20 FF
Pli ol 10 ekz.	17 FF

eldonis
Orientfranca Kultura E°-Federacio

*Avo Klazen retrovas vivenergion dank' al
brua aro da infanoj, kiuj postulas vivindan
vivon ... en griza industri-urbo...*

*La rakonto celas kaj infanojn... kaj ge-
patrojn!*

*Ĉiu el la sep bele ilustritaj ĉapitroj
aparte taŭgas kiel paroligiloj dum semajn-
finaj staĝoj aŭ vesperaj konversaciaj kur-
soj.*

Tradukis el la germana Edmond LUDWIG
Ilustris Pierre LATASTE

Unu ekzemplero	25 FF
Inter 3 kaj 10 ekz.	16 FF
Pli ol 10 ekz.	14 FF

konfeseme...
vi ne ronkos
dum la legado!



19 LA RONKANTA AVO

André Weckmann



eldonis
Orientfranca Kultura E°-Federacio

partoprenu
en la vivo de
polaj kamparanoj
tra la menso
kaj okuloj de...
neordinara
cikonido!



La Aventuroj de Kajĉjo

Kiu estus imaginta al si, ke eta cikonido kapablintus ŝovi sin tiom intime en la ĉiutagan vivon de ordinara kamparano?

Jen petolema kaj impertinenta, jen pen-
sema kaj eĉ helpema, Kajĉjo invitas nin
partopreni -cikonimaniere!- sian ĉiutagan
vivon en pola farmobieno...

Verkis pollingve Maria KOWNACKA
Tradukis esperantlingven Maria SITNIK
Ilustris Pol DENIS
kaj eldonis le "GROUPE ESPERANTO-MEUSE"


86 paĝoj el glacea papero
Akvarelo sur la frontpaĝo

Unu ekzemplero 70 FF

PROKSIMIĜAS LA LIBROFESTO!

En 1927 Julio Baghy iniciatis ke ĉiujare oni festu la datrevenon de L. L. Zamenhof, la 15-an de decembro, kiel Tagon de la Libro, okaze de kiu "ĉiu esperantisto havas la moralan devon aĉeti almenaŭ unu Esperanto-libron."

UEA invitas vin sekvi tiun belan tradicion ankaŭ ĉi-jare. Ni elektis kelkajn librojn, aparte taŭgajn por la Tago de la Libro, kaj forte rabatis iliajn prezojn. Kaptu la okazon – la rabato validas ĝis la fino de la jaro!



Vivo de Zamenhof

Edmond Privat, 133p.
Ilustrita eldono de la plej amata biografio de la Majstro.
Normala prezo: 18,90 gld.
Librotaga prezo: 12,60 gld.

Fundamenta krestomatia

L. L. Zamenhof, 18+446p.
Luksa reeldono de la baza verko kun novaj notoj de G. Waringhien.
Normala prezo: 48,00 gld.
Librotaga prezo: 32,00 gld.

Lingvo kaj vivo

Gaston Waringhien, 452p.
Erudiciaj sed facile legeblaj eseoj pri esperantologiaj temoj.
Normala prezo: 48,00 gld.
Librotaga prezo: 32,00 gld.

Proverbaro Esperanta

L. L. Zamenhof, 168p.
Instrua kaj amuza klasikaĵo kun kolekto de 2630 proverboj.
Normala prezo: 18,00 gld.
Librotaga prezo: 12,00 gld.

Esperanta antologio

red. William Auld, 900p.
La plej impona prezento de nia beletro: originalaj poemoj 1887-1981.
Normala prezo: 60,00 gld.
Librotaga prezo: 36,00 gld.

Jubileo

red. Mark Fettes, 164p.
Riĉe ilustrita libro pri la Jubilea Jaro 1987 kun valoraj artikoloj.
Normala prezo: 57,00 gld.
Librotaga prezo: 28,50 gld.

Madame, Monsieur, ☆

Depuis quelques années notre édition fonctionne au service du mouvement pour l'espéranto. Parmi nos éditions se trouvent entre autres la revue culturelle-littéraire *Iltis-Forum*, dont l'abonnement annuel coûte 24 marks allemands. Si vous ne la connaissez pas encore, nous vous en enverrons très volontiers un spécimen.

Aujourd'hui nous désirons particulièrement attirer votre attention sur trois traductions de la littérature française, que nous avons éditées. Les voici:

- Honoré de BALZAC: *Contes drôlatiques*. Traduction de Fernando de Diego. Saarbrücken: Iltis 1989. 106 p. ISBN 3-927613-02-9. Prix: 30 marks.
- *Francaj kanzonoj malnovaj kaj modernaj* (Chansons françaises anciennes et modernes). Traduction de Roger Bernard et Gaston Waringhien. Saarbrücken: Iltis 1991. 125 p. ISBN 3-927613-13-4. prix: 27,-- marks.
- Louis PERGAUD: *La butonmilito* (La guerre des boutons). Traduction de Roger Bernard. Saarbrücken: Iltis 1991. 194 p. ISBN 3-927613-18-5. Prix: 42 marks.

Il s'agit de brillantes traductions que l'on peut utiliser dans des cours supérieurs. Sans aucune doute, vous vous régalez, vous-même et/ou vos amis espérantistes étrangers.

Sont apparus chez nous également trois ouvrages du Dr. André Albault, la président de l'académie d'Espéranto. Voici leurs titres:

- *Nau prelegoj pri la Fundamento* (Neuf conférences sur 'La Fundamento'). Saarbrücken: Iltis 1990. 104 p. ISBN 3-927613-11-8. Prix: 27 marks.
- *Vojaĝo tra la landoj* (Voyage à travers les nations). Etude historico-linguistique sur les noms de pays. Saarbrücken: Iltis 1991. 195 p. ISBN 3-927613-22-3. Prix: 33 marks.
- *Multlingva glosaro pri landnomoj*. Complément à l'ouvrage cité au-dessus. Saarbrücken: Iltis 1991. 124 p. ISBN 3-927613-23-1. Prix: 27 marks.

Nous livrerions volontiers d'autres livres espérantistes. Demandez notre service de livres: notre catalogue de nos occasions, et la liste de nos éditions personnelles.

Avec nos bien sincères salutations

Ortwin Deubert



"MOTS RARES ET FAUX AMIS" ☆

Vi opinias, ke vi bone regas esperanton... Nu, do... malfermu la libreton de André CHERPILLOD, kaj provu traduki la menciitajn vortojn sen antaŭa rigardeto al la notita traduko!

Jen eble sufiĉa kialo por aldoni ĝin al viaj ĉiutagaj lerniloj.

Se vi daŭre opinias, ke vi ne bezonos ĝin, tiam legu la enkondukon. Tiam eble...!

(libreto havebla ĉe nia libro-servo)

Edmond LUDWIG

VOJAĜO AL SANKT-PETERBURGO



En Kaŭnas en Litovio okazis la ĉi-jara SAT-kongreso al kiu partoprenis pli ol 600 personoj, unua-foje okazinta en post-komunista lando. En la antaŭa numero de La Informilo vi povis legi pli detale pri ĉi-tiu kongreso-mem.

Dank'al partopreno de Esperantistoj el Sankt-Peterburgo kaj el Novgorod estis organizita vojaĝo al tiuj urboj por kelkaj (5) francaj partoprenantoj. Ĝi estis kvazaŭ nia

post-kongreso. La kongreso finiĝis la 15-an de aŭgusto, tiam ni ekvojaĝis unue aŭtobuse de Kaŭnas al Vilnius kaj de tie al Sankt-Peterburgo per trajno en komforta kuŝvagono. En ĉiu vagono estis deĵorantino por kontroli la biletojn kaj prunte-lui la litaĵojn. Ni traveturis dumnokte Latvion kaj atingis Rusion sen dogana kontrolo. La landlimoj inter tiuj freŝe sendependaj landoj ne jam estis starigitaj. Tial ni kuraĝis kaj aŭdacis veturi Rusion sen la kutime necesa vizo. Ni havis nur la litovan vizon.



"La bronza rajdanto", la plej bela skulptita monumento de Sankt-Peterburgo dediĉita al Petro la 1a, vera "kreinto" de la urbo. (mendis al la Franco Falconnet, Katerina la IIa).

Matene de la 16-a de aŭgusto ni eniris la stacidomon de Sankt-Peterburgo kie tamen estis ankoraŭ skribita "Leningrad". Tie troviĝis kvardeko da Esperantistoj plej-parte kongresintoj el Kaŭnas. Ni formis amikecan cirklon kaj kune kantis inter geamikoj plene ĝuantaj internacian etoson, miraklo de Esperanto.

Tuj ni konatiĝis kun la metroo de Sankt-Peterburgo, kiu konsistas el 5 ĉefaj linioj. Per rapidaj eskalatoroj ni profundiĝis almenaŭ je 30 metroj por atingi vastan halon kun severa kaj impona lenina stilo. Ambaŭ-flanke troviĝis la kajoj. En iuj stacioj la kajoj estis fermitaj per pluraj pordoj, kiuj kongrue malfermiĝas nur post la halto de la metroo, samtempe kun ties pordoj. Ĝi rapide veturis inter ne proksimaj stacioj. Iom post iom ni kutimiĝis kun la cirilaj skriboj. Nia cel-stacio estis Ленинский проспект Leninski Prospekt. De tie ni piede atingis la loĝejon de nia gastigantino ĉe la 7-a etaĝo de 10-etaĝa domo. (En Rusio same kiel en Japanio la ter-etaĝo estas la 1-a etaĝo sed ne la nula etaĝo kiel en Francio).

Sankt-Peterburgo estas historio-riĉa, mirinda kaj kontrasta urbo. Iam ĝi estis komparata al Vieno kaj al Venecio kaj daŭre estas rivalo de Moskvo. Ĝi retrovis sian originan nomon Sankt-Peterburgo, post Petrograd (de 1914 ĝis 1924), kaj Leningrad. La vidindaĵoj estas multnombraj:

La vintra palaco de la caro aŭ Muzeo de "Ermitage" estas unu el la plej belaj el la mondo pro ĝia arkitekturo, pro la interna ornamo kaj pro la verkoj kaj pentraĵoj, kiujn ĝi enhavas. Ĝi troviĝas ĉe la bordo de la rivero Neva. Ni vizitis ĝin dum duontago kaj povis admiri multajn pentraĵojn el Francio, Nederlando, Germanio, Italio, ktp. Iuj pretendas, ke tuta vivo ne sufiĉas por ĝin plene viziti.

En la rusa muzeo, ni malkovris arton de la rusaj pentristoj de la mezepoko ĝis la nuna jarcento. Ĝia vizito estis por ni vera surprizo pro la admirindaj pentraĵoj de tiu nekonata (de ni) rusa arto. Ni bedaŭris ne povi aĉeti reproduktaĵojn de iuj famaj pentristoj kiel Repin, Ajvazovskij, Rubliov, kaj aliaj.

La Isaka katedralo estas la plej alta konstruaĵo kun kupoloj de la mondo. Antaŭe ĝi funkciis kiel muzeo. Nur ĉi-jare ĝi estas redonita al la ortodoksa eklezio. En ĝi troviĝas admirindaj ikonoj kun 150 bibliaj bildoj realigitaj laŭ skizoj de A. Montferrand. En ortodoksaj preĝejoj ne estas benkoj por la fideluloj. Tiuj staras dum la Di-servoj, kiuj ŝajne pli longe daŭras ol katolikaj.

Pedrovdorets, je 29 km de Sankt-Peterburgo, estas arkitektura komplekso de la 18-a jarcento kun mirinda beleco. La parkoj ampleksas 800 hektarojn, 20 palacojn kaj paviljonojn. Pedrovdorets havas pli ol 140 fontanojn inter la plej belaj de la mondo. Ĝi troviĝas ĉe la marbordo. Revenvoje ni uzis ŝipon kaj en duon-horo atingis Sankt-Peterburgon tra la finna golfo.

Pučkin estas urbeto je 25 km de Sankt-Peterburgo, ligita al memoro de la fama rusa poeto. Tie ni vizitis belegan palacon de Katerina kun aparta lukso kaj mirinda spegulo-salonego kun pli ol 600 kandeloj. Ni eĉ ĝuis profesian gvidadon en Esperanto.

La fondiĝo de la fortikaĵo Petro kaj Paŭlo la 27-an de majo 1703 estas konsiderata kiel la naskiĝdato de la urbo-mem. Ĝi estis la tombejoj de la caroj, kaj pli poste politika malliberejo. Nuntempe ĝi estas uzata kiel muzeo.

Njevski Prospekt (aŭ avenuo Njevski) estas unu el ĉefaj avenuoj en Sankt-Peterburgo, kun multaj magazenoj, la plej grandaj libro-vendejoj. Ni plurfoje vizitis ĝin. Apud la ŝtataj vendejoj jam troviĝas vendejoj pri okcidentaj varoj kaj markoj. Ankaŭ multaj privataj vendistoj modeste vendas sur trotuaro diversajn artaĵojn, librojn, importitajn varojn. Ĉe elirejo de metro-stacio staras dudeko da etvendistoj. Unu proponas paron da ŝuoj, alia ĉemizon aŭ florojn aŭ cigaredojn, alia vestaĵon ktp. Ĉu speco de pul-merkato? Ŝajne tio estas unu el la ŝanĝoj de post-komunismo. En la urbo multo estas riparata kaj eĉ pli multo estas riparenda. Restoracioj, kafejoj aŭ eĉ iuj vendejoj, estis preskaŭ nerimarkeblaj de ekstere, ĉu pro manko de allogaj ŝildoj? Ĉu pro nia ne spontana kompreno de la lingvo? Sed transirante modestan enirpordon ni ofte kaj surprize malkovris plaĉan, ĉarman aŭ pitoreskan restoracion kelkfoje eĉ luksetan. Ofte necesis tuj mendi la tutan menuon de la antaŭ-manĝo ĝis la deserto kaj eĉ la kafon. Sed dank'al niaj gvidantinoj la mendoj estis rapide faritaj kaj la servo estis akurate plenumita. En magazenoj ne estis tiom facile aĉeti, ĉar malofte ili estis memservaj. Necesis do paroli la rusan por povi tuŝi la artiklojn por eventuala elekto kaj aĉeto, sed feliĉe ni estis ĉiam helpataj. Iun vesperon, ni havis la plezuron spekti dum 3 horoj rusan baleton de Ĉajkovski "La cigna lago". Mirinde bela plenumo kun ensorĉa muziko.

La ekonomia situacio de Rusio estas kriza kun grandega inflacio, eble pli ol 50% po monate. La kurzo de la rublo estas nekompreneble favora al okcidentanoj. Tio signifas aliflanke, ke valutoj estas multekostaj por rusoj, kaj vojaĝo al eksterlando preskaŭ neebbla. Por unu franca franko ni povis aĉeti 30 rublojn. Libroj, bildkartoj, estis vere malmultekostaj. Jen kelkaj prezoj en rubloj: libro:30, bildkarto:1, metro-ĵetono:1, manĝo en restoracio de 80 ĝis 300, kg da pomoj 10, kg da bananoj 170 (importitaj fruktoj), eniro al baledo:25. La eniroj al muzeoj estis de 20 ĝis 60 rubloj por rusoj kaj kelkfoje dekoble pli por eksterlandanoj, sed dank'al niaj rus(z)aj gvidantinoj ni pagis nur rusan tarifon, ŝajnigante esti rusoj. Ĉe la bilet-kontrolo ni simple silentis ruse kaj ruze. Al eksterlandanoj oni ofte petis pagon per dolaroj. Kompreneble ni evitis la hotelojn kaj restoraciojn rezervitajn al okcidentanoj, kaj nur dolare pageblaj. Ŝajne 100 dolaroj por unu nokto en Hotelo "Europe".

Nia turismado per Esperanto ja estis tute alia: Ni estis gastigataj kaj gvidataj de Esperantistinoj, ni povis viziti hejmojn kaj Esperanto-klubon de Sankt-Peterburgo kaj ĉefe rekte komuniki kun ili. Ni ne plu estis francoj kaj rusoj sed geamikoj, alia miraklo de Esperanto. Ni spertis, la rusan gastamecon, la rusajn matenmaĝojn abundajn kvazaŭ tagmanĝo, la oftan teo-trinkadon eĉ antaŭ nokto-mezo, (ĝi estis la ĉefa trinkaĵo), la mildan guston de betul-ŝela suko. Nur malofte la teo estis pretigita per samovaro, kiu iĝis ĉefe ornamaĵo. Ni eksciis, kio estas oksikokoj, ruĝaj beroj kolektitaj en nordaj landoj, kiel Kareljo (apud Finnlando). Ĝi similas al vakcinio kaj mirtelo. Ni kutimiĝis pagi per multaj mon-biletoj je 1 3 5 10 25 rubloj, kiuj kelkfoje plenŝtopis niajn monujojn. Rublaj moneroj preskaŭ ne ekzistis. Ni veturis per aŭtobusoj, trajnoj, elektraj trajnoj por mallongaj distancoj, ŝipo, metroo kaj ofte piediris. Ni spertis kiel elturniĝi, kiam mendita taksio malakuratas.... ktp. ktp.

Post 6 tagoj da vizito en Sankt-Peterburgo ni trajne veturis dum 4 horoj al Novgorod je 200 km sud-oriente. La trajno tamen haltis dum pli ol 20 minutoj en survojaj stacioj. Pri Novgorod vi povos legi, sur alia paĝo, raporton de alia partoprenanto.

Por la reven-vojaĝo ni veturis aŭtobuse de Novgorod al Sankt-Peterburgo, la postan tagon trajne al Kaŭnas, kie estis lasita aŭtomobilo de nia kolego. Per tiu aŭto ni celis atingi Francion, sed tiam ni spertis la plej malagrablan parton de nia vojaĝo. Por transiri la land-limon de Litovio al Pollando ni devis atendi 38 horojn. La vico estis longa je 2 km kaj malrapidege progresis. Ni alvenis tie la 27.8.92 post la 12-a horo kaj la 29-an je la 3-a matene ni estis finfine en Pollando. Post du tagoj da veturado tra Pollando kaj Germanio ni atingis Francion.

Malgraŭ tiu lasta nigra punkto, tiu vojaĝo estis vere interesa, impresriĉa, neforgesebla. Ĉu iam mi revidos Sankt-Peterburgon? Ĉu eble okaze de la blankaj noktoj? Sed tio estus alia vojaĝo, alia revo! Ĝis revido Sankt-Peterburgo!

MONDKONGRESO DE ESPERANTISTAJ HANDIKAPULOJ

Mi partoprenis de la 18a ĝis la 25a de julio en la unua ĉi-supre aludita kongreso en FRANTIŠKOVY LÁZNĚ, en Ĉeĥoslovakio, kaj mi volus kapti la atenton de la handikapitaj legantoj kaj de ĉiuj federacianoj pri la efektivigitaj laboroj dum tiu evento:

- Starigo de internaciaj strukturoj
- Debatoj pri la viv- kaj laborkondiĉoj en la prezentitaj landoj
- Uzado de Esperanto por internaciaj rilatoj.

Interesatoj povas sin turni rekte al la sidejo de la:

Asocio de Esperantistaj Handikapuloj - A.E.H.

PK 63

CS - 27401 SLANŮ

aŭ kontakti min por havigi al si pli multajn informojn:

André WAGNER

16, Rue Noblemaire

F-57260 DIEUZE

Ĉeestis ankaŭ tiun kongreson nia samideano Odette SCHEIDEL, el Betschdorf, kies raporton vi malkovru ĉi-sube.

Františkovy Lazné havas riĉan historion. La unuaj mencioj pri ĉi-tieaj kuracfontoj aperas en la jaro 1502, kaj jam komence de la 17a jarcento alvenas ĉi-tien kronitaj ŝtatestroj kaj aliaj gravuloj, inter ili GOETHE kaj BEETHOVEN.

En tiu urbo estis inaŭgurita, la 1an de junio 1914 dum la 4a Tut-aŭstria Esperanto-Kongreso, monumento -la unua en la mondo- honore al D-r° Zamenhof. Ĝin tute detruis la Nazioj en 1938. Surloke de la detruita monumento, la handikapitaj esperantistoj senvaligis memortabulon okaze de internacia renkontiĝo, la 15an de oktobro 1991.

La ĉi-jara kongreso malfermiĝis antaŭ tiu memortabulo, kie Helina Kuropatnika Salamon legis poemon dediĉitan al la kreinto de Esperanto. Ni memorigu, ke D-r° Zamenhof ban-gastis ĉi-tie.

Post la deklamo de tiu poemo, kiun vi povos malkovri aliloke, en la ĉeesto de la urbestro estis plantitaj arboj, nome de Hungario, Kanado, Ĉeĥoslovakio kaj Francio.

Permesu, ke mi priskribu la francan, kiu staras meze de la aliaj. Tiu arbo, plantita emocie, havas tri branĉojn... Ĉu ne estus imag-bildo de la estintaj orientaj landoj kaj de la okcidentaj, kun forta branĉo meze de ili, kiu simbolus, plena je espero, naskiĝantan Eŭropon kunigantan la du aluditajn mondopartojn? Oni rajtas revii, ĉu ne?

En tiu raporto oni devas mencii la multnombrajn ekskursojn, Ĉeb, Karlovy Vary, kie fonto ŝprucas 12 metrojn supren kun temperaturo je 72 gradoj, Marianšké Lazné, kie ni ĝuas mirindan spektaklon: t.e. la "kantantaj fontoj" -mi preferus "dancantaj fontoj"! Laŭ la muzikritmo, ŝprucoj pli aŭ malpli rapidas, pli aŭ malpli forte, pli aŭ malpli alten, larĝe, grupe, sole...

Kultur-riĉaj estis la diversaj prelegoj; lumbildoj, kongresraporto, aparte ĝindaj koncertoj. Bedaŭrinde rapide forflugis la tempo, sonis horo de disiĝo por tiuj, kiuj tuj kongresos en Vieno.. Jen la plej emocia, kortuŝa momento... Neatendite, grupo da kongresanoj akompanis nin ĝis la stacidomo, kapmarŝante, svingante standardon... La unua estis zorgantino de blinda samideano el Kanado, ankaŭ estonta partoprenanto de la Universala Kongreso. Fajfas, ekveturas la trajno, alten svingiĝas la standardo... "Ĝis revido, ĝis baldaŭ!"

La rezolucio de tiu fak-kongreso estos transdonita al UEA-instancoj, komence de la U.K°. Tiu internacia renkontiĝo, kies celo estis interkonatigi handikapulojn, firmigi bazojn de monda asocio, restos neforgesebla pro la daŭre sentitaj frateco kaj amikeco. Dankon por la ekzemplo donita!

Odette SCHEIDEL (67-Betschdorf)

★★★★ rapide... efficace ...

 **NOTRE COURS D'ESPERANTO
PAR CORRESPONDANCE**



- ☆ un matériel moderne
- ☆ une technique éprouvée
- ☆ un réseau d'animateurs compétents
- ☆ un savoir immédiatement opérationnel

UNE ADRESSE



"Activité ESPERANTO"
MJC Ph. Desforges

27, Rue de la République
54000 NANCY

=====

ĉe niaj "najbaroj" chez nos "voisins"



Nia aktiva samideanino Annsybill KAMPHAUSEN (Darmstadt - RFA) raportis en la UK^o en Vieno pri siaj ĵusaj travivaĵoj en Afriko. Grandvalora ni taksas tiun raporton de sentema virino, kiu proprasperte konsciis pri la nunaj problemoj de la junaj afrikaj esperantistoj.

... "Mi vojaĝis afriken en decembro 1991. 19 eŭropanoj kaj 70 afrikanoj estis en la *Dua Afrika Kongreso en COTONOU, Benino*.

Ni loĝis, manĝis, ridis, dancis, kantis, parolis kune, foliumis najn diversajn vivstilojn, pensmanierojn... malkovris, ĝuis unu la alian! Naskiĝis solidareco dum tiu eksterordinara kongreso.

Ni siestis sur strando. Mi demandis: "Kiel vi Ben, uzas Esperanton en via vilaĝeto Tchatchou, meze de Benino?... Kaj vi, bela amikino Osakwe, en antaŭ-urbo de Lagos?... Kiel kaj kiam vi spertas esperantan etoson?..."

Mi fosis, mi ŝokiĝis, mi resumis.

Afrikaj Esperantistoj preskaŭ neniam povas uzi, paroli Esperanton. Pro manko da mono ili preskaŭ neniam kapablas aliĝi al kongreso, viziti aliajn klubojn, interŝanĝi ideojn, paroli kun aliaj, pli spertaj. Ili ne povas aĉeti librojn, gazetojn, ofte eĉ ne busbileton por viziti klubon en la sama urbego, ofte eĉ ne poŝtmarkon por skribi al korespondamiko - poŝtmarko kostas ekz. en Benino *triono pli ol plej modesta manĝo en plej modesta afrika restoracio* -.

Tre bone komprenis mi, nun, senfinajn interparoladojn dumkongrese, ĉiamajn demandojn, interŝanĝon de opinioj... kaj tiun grandegan ĝojon renkonti Esperantistojn el 15 landoj: "O, ke vi estas ĉi-tie! O, denove mi devas saluti vin", ĉiam mi aŭdis.

Jean petis: "Kunprenu, afranku leterojn al eŭropaj amikoj miaj... Mi ne povas pagi la poŝtmarkojn". "Volonte", mi respondis. Li eksaltis, ekkriis pro ĝojo, forkuris, revenis kun la leteroj... "Ili estas ja pli ol miaj amikoj!", li diris, okuloj tute brilantaj. Neniam mi forgesos lian ĝojplenan vizaĝon. Konsekvencis: hodiaŭ mi korespondas kun pluraj Esperantistoj en Afriko!

Mi citetos el kelkaj leteroj... Sentu iom da afrika etoso, leterkulturo, amikeco kaj graveco de leterinterŝanĝo:

Jean, el Lokossa, Benino:

"Granda, grandega estis mia ĝojo, kiam mi ricevis vian afablan leteron, ĉar tiun leteron mi atendis senpacience, sendorme, dum longa tempo. fine ĝi venas por resaniĝi min el mia eterna senpacieneco, por gndigi mian animon, mian senton, mian ĝojon. Intertempe mi kredis, ke eble vi ne volis amikiĝi kun mi. Mi sincere malĝojis. Sed nun mi povas ĝoji, ĉar mi konstatas, ke miaj tiamaj ideoj estis iluzioj!".

Ben, el Parakou, Benino: "Mi esperas, ke ni fariĝos bonegaj kaj sinceraĵ geamikoj, kaj mi pensas, ke nia amikeco trans kontinent-limojn pluvivos".

Kaj Charles, el Owerri, Niĝerio: "...Pro tio mi deziras sciigi vin, ke mi ŝatus interŝanĝi le-

terojn, vidpunktojn kaj ke mi deziras kunlabori kun vi ĉies-sfere".

Leteroj afrikaj ĝojigas min, pro bela, vivoplena lingvo, aparta, sincera rilato al la vorto preciaj demandoj, manko de trivialeco. Mi demandas ĉion, kvazaŭ mi vizitus mian amikon, kvazaŭ li vizitus min. Se mi ne komprenas, mi demandas: "Ĉu tio estas afrika pensmaniero? Klarigu! Bonvolemaj amikoj respondas: "Kompreni vi ne povas... Afriko estas alie!".

Ni diskutas problemojn en Eŭropa komunumo kaj Afriko - kie ekzistas mil lingvoj! - , eksplodema kaj ekde jaroj diskutata afero en Afriko.

Ni diskutas pri demokratio, pri demokratiigo. Junuloj tre bone scias, ke kluboj kaj nunaj aŭ estontaj memstaraj landaj asocioj nur plendemokratie funkcias kaj postvivos. Mi detalas funkcion kaj socialan funkcion de miaj landaj kluboj, akcentante membran egalrajtecon, financon malkaŝon. Ni interŝanĝas praktikajn servojn.

Korespondado estas preskaŭ la sola maniero por amikoj niaj en Afriko uzi Esperanton, sperti superadon de lingvaj baroj, sperti riĉecon de kultura interŝanĝo. Multnombraj estas la ŝancoj sentigi esperantan etoson letere al unuopulo same kiel al klubo. Multnombraj estas la ŝancoj pliriĉigi kluban vivon - en Afriko same kiel en Eŭropo - reciproke: fotoj pri familio, klubo, urbo, lando... artikoloj, gazetoj. *Kial ne ĝemeligi vian klubon kun afrika? Malgranda dokumentaĵo pri via klubo, urbo, lando ebligas ekspozicion en afrika klubo. Multaj Afrikanoj verkas: poemoj, teatraĵoj ebligas kulturan vesperon en via klubo.*

Pluraj afrikaj kluboj aktivigas dum lokaj festoj, dancas, kantas... Togolandaĵ kluboj arbariĝis pejzaĝon! Jen belaj, interesaj informoj por via klubo aŭ loka gazeto!

Kara amiko skribas: "Kiel fari por konduki la junularon interesiĝi pri la movado enafrikaj landoj, kie la malriĉeco severe punas? Fakte ni estas milionoj da gejunuloj sen laboro! Iuj suferas, aliaj kiel ni modeste vivas dank' al niaj grandaj fratoj, niaj parencoj. Sed la helpo de niaj parencoj estas aldono al niaj ĉiutagaĵ penoj".

Regas malriĉeco en Afriko, regas senlaboreco. Ne lekiĝas mi pri koloniismo aŭ novaĵ formoj de ekspluatado, ne traktas mi okcidentajn amaskomunikilojn, kiuj senskrupule komercas teruran informon post terura informo pri Afriko, por plimultiĝi eldonkvantojn, misfamigante tiel homojn de tuta kontinento kiel letargiaj kaj nekapablaj, precize kiel iamaj kolonistoj por apologii pri hom-malestiman politiko!

Regas malsato, regas mizero en Afriko... Videbla. Sentebla. Ne bruega. Kvietita. Malbrua.

Pro tio, pro kialoj ekonomiaj, Afrikanoj kelkfoje eklernas nian lingvon, esperante savon el

mizero, esperante laboron. Mi opinias, ke neniu rajtas juĝi pri tio.

En mia sata lando oni eklernas Esperanton ofte pro varma, amika klubvivo, aŭ rifuzas lerni ĝin pro ekonomiaj konsideroj.

Gbeglo Koffi, instruisto kaj verkisto en Togolando, en iu lasta aperinta numero de "Esperanto en Afriko", sciigas nin pri tiu ofta evoluo de afrika Esperantisto -de komenca espero ricevi panon, laboron- al transformado kiel sincera, fidinda, entuziasma Esperantisto!

La afrika gazetaro *neniam* informas pri malriĉeco, senlaboreco en Eŭropo aŭ aliloke. Pro tio multaj Afrikanoj revas, identas Eŭropon kiel riĉegan, bonegan paradizon!

Post mia vojaĝo mi aŭdis, ke pluraj Afrikanoj petis aĵojn, monon... Petitaj Eŭropanoj malkontentas. Estas problemo. Ne ni forbalau ĝin. Mi sciigos al vi miajn konkretajn spertojn dum tri semajnoj afrikaj.

Sed plej unua, laŭte kaj klare mi diras: Afrikanoj *ne* estas petantoj, sed en Afriko homoj vivas, kiuj petas. *Tiom longe* kiom ekzistos malriĉeco, senlaboreco, mizero, malsato, *tiom longe* homoj ekzistos, kiuj petos en la tuta mondo!

Renkontis mi 90 Esperantistojn... Petis min 3

"Donacu al mi vian brakhorloĝon...", dek sesjara lernanto petis. *Ĉiu junulo en la mondo deziras brakhorloĝon, ĉu ne?*

"Mankas mikroskopo en mia lernejo, se vi deziras, mi donos al vi la adreson; tiel, vi povos trakti rekte", bona amiko diris, evitante, ke mi malbone opinias pri li.

Tria peto temis pri revendeblaj varoj.

Ricevis mi 3 perpoŝtajn petojn: "Mankas al mi libro pri germanaj idiomatikaj esprimoj", lernanto skribas...

"La respondkuponon valoras nur 240 CAF kaj mi bezonas 300 CAF por afranki vian leteron", informas min tre bona amiko... Estas kvinono de guldeno.

Kaj letero malĝojiga: "Loĝigu min, serĉu laboron por mi, pro ekonomiaj kaj politikaj kialoj en mia lando... Poste mi iros ameriken". Tiu amiko kore gastigis min en sia domo kaj faris ĉion por plezurigi min, tre agrablan kaj interesan vesperon ni pasigis. "Neinformita pri vizoproblemoj, restad- kaj laborpermesoj, laboreblecoj" li skribas. Mi respondas per longa letero, lin kuraĝigante. Ne scias nun mi, ĉu nia interkorespondado daŭros aŭ ĉesos pro sen-iluziigo pri Esperanto. Mi esperas, ke nia amikeco superos tian evidentan problemon...

(sekvota)

VOĈO EL SIBIU... (Rumanio) Fidelas al siaj francaj geamikoj kaj al nia bulteno Vasile **ALBU**, kies E^o-aktivaĵoj ne konas limojn! Freŝbakitaj rumanaj esperantistoj ege sopiras al kontaktoj kun okcidentaj landoj... Solidareco nia je ili neniel devas bremsiĝi...

Post la revolucio en decembro 1989 mi ofte informis la legantojn de "La Informilo" pri la E^o-agado en la rumana, revolucia, martira urbo **SIBIU**, mia silento en nuna jaro ne signifas, ke tiu agado estingiĝis... "La flamo E^o en **SIBIU** daŭre brulas!"

Krom la fondiĝo de la ĉi-tiea rumana filio de AIS* kaj post ĝia unua stud-serio, pri kiu mi jam raportis en La I^o (n^oj 72 kaj 77), same en la kadro de la Universitato en **SIBIU** oni organizis pasintan jaron 3 E^o-kursojn. La unuan mi gvidis por la studentoj en psiko-pedagogia kibernetiko; temis pri perfektiga kurso, por ke ili povu sukcesi al la E^o-faka ekzameno antaŭ D-r^o H. FRANK, el PADERBORN (FGR), prezidanto de AIS kaj povu minimume konversacii dum la 9a AIS-studforma-universitata serio en **BYALISTOKO**, la 24/02-03/03/1991.

Tie partoprenis 11 gestudentoj: Patricia MARCU, Florea BOGDAN, Mihaela BUCUȚĂ, Mihaela BĂNUȚĂ, Nicoleta STANA, Violeta DINICĂ, Juliana DIȚU, Gheorgina MITVACHE, Blanca GRAMA, Adrian SANDU kaj Mirela MUNTEANU, gviditaj de lektori-no Mihaela MOGA.

La duan kurson intensan mi instruis de la 8a de marto ĝis la 17a, al 57 inĝenieroj, ekonomistoj kaj juristoj, kandidatoj al AIS-stipendioj por partopreni en la 2-semajna bloko da seminarioj pri "Transiro al merkato-orientita ekonomio" en BERLINO. Post la kurso, kune kun prof. D-r^o I.F. BOCIORT (prezidanto de la Rumana E^o-Asocio) ni preparis ekzamenon por ĉiuj kandidatoj el la tuta lando. La tria kurso oka-

zis en oktobro-decembro 91, direktita al la 1a studjara studentoj en psiko-pedagogia kibernetiko; partoprenis en la kurso 17 gestudentoj. Dum la sama periodo, printempe, mi instruis al la 6 pliaĝaj gekursanoj ĉe la Junulara Kulturdomo.

La 7/12ajn de aprilo 1991 mi partoprenis al la 9a Internacia Metodika Seminario okazinta en ODORHEIUL SECUIESC, kie mi sukcesis ekzamenon kaj ricevis mezgradan diplomon ILEI-UEA* diplomon (atestilon).

Plue, ekde somero 1991, de IKUE*-prezidanto, S-r^o Sac. DUILIO MAZGNANI (I), kaj de rom-katolika helpepiskopo de ALBA JULIA, Mons. Gyorgy JAKBINYI, mi rocevis ateston esti landa reprezentanto de IKUE por Rumanio. Tial, sekve, mi starigis rumanan sektion de IKUE, al kiu enskribiĝis 55 membroj (15 en **SIBIU**), kaj la 10/11ajn de pasinta junio ni havis la unuan renkonton en ALBA JULIA, kie elektiĝis la estraro (G. JAKUBINYI, honora prezidanto, V. ALBU, efektiva prezidanto, I. SZUCS, vicprezidanto, S. prezidanto, I. SZÜCS, vicprezidanto, S. OANCEA, sekretario, B. VASILESCU, trezoristo, D. TELEKY paroko. Kiel peranto mi zorgis -kaj zorgas- pri abonoj al la revuoj "Espero Katolika" kaj "Juna Amiko". La parokanoj de D. Magnani (el Rimini), per mon-donaco, helpis al ni por realigi la unuan IKUE-kunvenon... nun dum alta inflacio! Ĉi-okaze mi tre dankas al ili.

En januaro 92 vizitis nin S-r^o Denis FLOCHON franca fervojista esperantisto el LIONO, kiu en la studĉambro de la klubo de lokaj fervojistoj prezentis du video-kasedojn pri E^o al dudek es-

perantistoj de Sibiu. Poste mi komencis instrui al 5 fervojistoj, inter ili, la geedzoj inĝenieroj TIMPANARIU, kiuj partoprenis en majo en la Internacia Kongreso Faka en MÜNSTER (FGR); poste ili vizitis samprofesiulojn en LIONO. Meze de pasinta septembro, post la kongreso de la rumana sam-faka asocio en BRAȘOV, kie, okaze, fondiĝis oficiale la ĵus aludita asocio kun 20 filioj; preskaŭ ĉiuj partoprenantoj estis gastoj ĉe siaj samprofesiaj samideanoj en Sibiu, kaj vizitis la urbon kaj ĝiajn muzeojn (ilin mi ĉiĉeronis).

Dum la pasinta printempo vizitis min angla amiko, E. BATHEY, el Bath, kiu partoprenis en kurveno de la franca-rumana amikeca asocio, filio Sibiu, kies membro mi estas: li tie parolis pri E^o tiel konvinkinte, ke, tuj poste, malfermiĝis kurso en la kadro de la ĉi-supra asocio, en la sidejo de la Armea Domo... La kurso daŭre okazas ankoraŭ nun, ĝis la venonta printempo kun 15 gekursanoj.

* IKUE = Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista

Niaj legantoj dezirantaj disponigi al V.A. didaktikan materialon direktu sia(j)n sendaĵo(j)n al:
Vasile ALBU, Str. Eroilor 9, R - 2400 SIBIU

Nova plenespera E^o-agado oni lanĉas en la kadro de la fama "Asocio Transilvano por la Kulturo de la Rumana Popolo" (ASTRA, fondita en 1861), kaj ankaŭ ĉe nia Universitato, eventoj pri kiuj mi raportos venonte.

Grandan malfacilaĵon renkontas la novbakitaj esperantistoj pro la manko de lern-libroj, kaj precipe vortaroj. Ĉi-okaze mi dankas al la francaj samideanoj, Mireille DILLENCHNEIDER, Pol DENIS, Claude JOURDE, Jean BARNOUIN, André GROSSMANN, René BILLOT, D. POISSON, Daniel DAVID, H. MENARD kaj aliaj, kiuj, antaŭ kaj ĉefe post nia revolucio, multe kaj afable helpis min sendante utilajn esperantajjn (librojn, vortarojn, revuojn), por ke mi povu instrui, kaj eĉ por miaj kursanoj, kiuj multnombraj bone regas la francan lingvon.

Vasile ALBU - UEA-Fakdelegito
Prezidanto de la Filio SIBIU de R.E.A.

* AIS = Akademio Internacia de la Sciencoj
(sidejo: San Marino)

argumentaro argumentaire



KION FARI rilate al la angla?



Konstatoj

1. Vole nevole ni objekte konstatu, ke nun la angla, germana NECESAS en pluraj kampoj.

2. Estus stulte proponi tujan anstataŭigon de la angla per esperanto, ĉar en nia lingvo ekzistas nur minimuma kvanto de baza fakliteraturo, kaj ne multas fakuloj, kiuj kompetente scipovas la internacian lingvon.

3. Tro ofte esperantistoj reagis neracie, absurde, kiam iu parolas aŭ skribas favore al la angla kiel internacia komunikilo.

Ĉu sekve ni faru nenion?

1. Neniel ni iru kontraŭ la fluo! Rekonu la pozitivan rolon de la angla, sed eble tuj aldonu ĝiajn mankojn: ne en ĉiuj branĉoj (ekz. ĉe la poŝto, medicino), kaj ne ĉie (Sudameriko, Orienta Eŭropo) ĝi estas uzata.

